# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)



Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie XXXXX BAUGE ( 49150)
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59800 LILLE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d'Orves 54490 PIENNES

C.C.P.: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2 324 93 N ROUEN.



==== la n°: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====
****************************************************************************************************

==== N° 177 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1993 ====
****************************************************************************************************

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.
****************************************************************************************************


## LE MOT DU PRESIDENT

A la fin du mois de juillet prochain aura lieu à Viviers (Ardèche) une rencontre oecuménique qui réunira pendant une semaine espérantistes catholiques et protestants.

Nul doute que cette rencontre, comme celles qui l' ont précédée, sera un temps fort d' amitié, de rapprochement fraternel et de respect du point de vue de l' Autre. Nous avons tant de choses en commun avec nos frères séparés qu' il est possible de découvrir, dans le respect réciproque de nos Credos, que nous sommes tous fils du même père aimant et que le temps des exclusives est maintenant dépassé.

La pratique d' une même langue internationale et le sentiment d' être, malgré nos divergences et nos sensibilités différentes, les adeptes du même Evangile, ne peut être que bénéfique pour nous aider à faire les uns vers les autres un premier pas vers cette Unité des Chrétiens qui nous réunira un jour, quand Dieu voudra, comme Il Voudra.

Se connaître, s' estimer, dialoguer après s' être parfois regardés en chiens de faïence pendant des lustres, ce sera sans doute faire oeuvre utile et créer, avec nos frères protestants, un courant de sympathie et de compréhension réciproque.

## LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Fine de julio okazos en Viviers (Ardèche) ekumena renkonto, kiu dum unu semajno arigis katolikojn kaj protestantojn esperantistojn.

Sendube tiu renkonto, same kiel la antaŭaj, estos grava tempo pri amikeco, frata alproksimigo kaj respekto pri alies vidpunkto. Ni havas tiom da komun-

../...

aĵoj kun niaj apartigitaj fratoj, ke eblas malkovri, en la reciproka respekto de niaj Kredoj, ke ni ĉiuj estas filoj de la sama amanta Patro, kaj ke la tempo de la forigoj estas nun for.

Praktiki unu saman internacian lingvon kaj senti, ke, malgraŭ niaj malsimilaĵoj kaj niaj diversaj sentemoj, ni estas adeptoj de la sama Evangelio, povas esti nur profitdone por helpi nin ekpaŝi unu al la alia al la Unueco de la Kristanoj, kiu iam kunigos nin, kiam Dio volos, kiel Li volos.

Koni unu la alian, ami sin reciproke, dialogi post jarcentoj de malamika reciproka konsidero, certe estos utila faro kaj kreado, kun niaj protestantaj fratoj, de simpatia sento kaj interkompreno.

A. B.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

PREĜOJ AL LA SANKTA SPIRITO

Spirito pri fajro, Spirito pri amo, instruu nin ami; ami Dion kaj nian proksimulon, kiel Jesuo petas kaj laŭ la ekzemplo, kiun Li donis al ni; ami Dion pli ol ĉion, ĝis en la nemeritita afliktaĵo, kiel Jesuo sur la kruco, kaj ami niajn fratojn malgraŭ iliaj malvirtoj, malgraŭ la suferoj, kiujn ili foje kaŭzas al ni, kiel Jesuo sur la kruco. Bonvolu venki nian egoismon kaj faru, ke la dia amo regu en ni.

Gvidu min per viaj konsiloj en la delikataj kaj malfacilaj cirkonstancoj, kiam mi ne klare vidas, kion mi faru. Kaj sugestu al mi la plej bonajn decidojn prenendajn por la gloro de Dio kaj ĉies bono.

Spirito pri Sankteco, Sanktiganto de la animoj, sanktigu nin. Purigu nin el niaj pekoj, resanigu nin el niaj malbonaĵoj kaj progresigu nin, per via graco kaj niaj personaj streboj, en la virtoj kaj sankteco, kiuj konvenas al la gefiloj de la triobla sankta Dio. Amen.

Ch. SAUTEUR

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

LA VERA AMIKO

Jesuo, vi estas la sola kaj vera amiko. Vi kundividas miajn malagrablaĵojn, vi zorgas pri ili, vi havas la sekreton por transformi ilin je bono. Vi bonkore aŭskultas min, kiam mi rakontas miajn ĉagrenojn kaj vi neniam preterlasas ilian mildigon.

Mi ĉiam kaj ĉie trovas vin; vi neniam estas malproksima kaj, se mi devas translokiĝi, mi estas certa trovi vin, kien mi iras.

Mi neniam estas laca aŭskulti min, vi neniam estas laca bonfari al mi. Mi estas tutcerta, ke mi estas amata, se mi amas vin.

Vi pacience toleras miajn malvirtojn; eĉ miaj malfidelaĵoj, mia nedankemo ne ofendas vin; vi ĉiam pretas pardoni, se mi tion deziras.

Ho Jesuo, donu al mi tian deziron, por ke mi estu tute via dum tiu nuna tempo kaj dum la eterneco.

S-ta Claude La Colombière

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

KELKAJ INFORMOJ

1) En decembro 1992 aperis "Grand Dictionnaire Français-Esperanto" eldonita de U.F.E. 944 paĝoj, 32 000 vortoj kaj 100 000 esprimoj. 250 F + sendokostoj.
2) Internacia korusa staĝo en Fontaine de Vaucluse de la 19-a ĝis la 23-a de julio 1993. Prezo: 1 000 F. Aliĝoj: B. Bigonnet La Paillane 84330 CAROMB.
3) Nia membro R. Lebrun 58, route des Andelys 27510 PRESSAGNY l' Orgueilleux, vendas esperantaĵojn (revuojn, librojn). Petu lian katalogon.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

NEKROLOGO

En Tallinn (Estonio) forpasis en januaro nia fidela anino Antonina Apollo 83-jara. Kvankam ŝi lernis Esperanton sufiĉe malfrue, ŝi plene majstris la lingvon en kiu ŝi verkis multajn delikatajn poemojn kaj tradukis estonajn verkojn. En ŝia malforta korpo vivis forta, amoplena animo, kiu pace ripozu.

../...

Jen la poemo, kiun ŝi sendis al mi en sia lasta letero:

LA VINTRA TAGO

Jam venis la vintro.
Tra fenestra fendo,
eĉ ankaŭ tra vitro
penetras la vento.
Ĉion plenigas
la spiro glacia,
kaj glacio fariĝas
la animo mia.
Kvazaŭ voĉo sonas
de ekstere: "Sciu,
vin plu ja bezonas
neniu, neniu...
Nek iu sola
en mondo tuta".
Kaj vorto konsola
malaperis muta.
La nuboj tristas
sur l' ĉielo pala,
kaj por mi ekzistas
nur solec' totala.

Antonina APOLLO ( 30/11/1992)

Verkis la nekrologo J. Vincent

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

PRI KLEMENTO MYIONNET

Ĉiujare, jam de 41 jaroj, multaj el la ~~vizitantoj~~ de la Kultura Esperanto-Domo miras pri la beleco de la ~~kastelo kaj ties~~ ĉirkaŭaĵo, imagas, petas informojn pri ties historio, ~~certe riĉa~~ je agadoj, ĉefe lokaj, de antaŭaj enloĝantoj.

Hodiaŭ, ni elvokos nur unu el ili, kiu, fakte, pro parenceco al iama posedanto, tie ĝuis agrablan, fruktodonan restadon. La ĉi supra titolo jam indikas gilian nomon, verŝajne ne konatan de multaj. Kiu do estis Klemento Myionnet, "giganto kun koro de infano", kiel oni nomis lin, unua frato de la religia komunumo "S-ta Vincento de Paŭlo", dediĉita al helpo, subteno, releviĝo de la plej malfeliĉaj homoj.

Klemento naskiĝis en 1812 en Angers, kie la patro estis paciga juĝisto, sed de la dek-unua ĝis la dek-sepa vivjaro, li restadis en "Grésillon", kies sinsekvaj posedantoj havis gravajn rolojn en la urbo Baugé. Tie gastigata dum ses jaroj, la junulo studis en urba , komuna kolegio, fondita de unu el la antaŭaj kastelestroj. Post ne tre kontentiga lernado, la juna, malobeema, ribelanto elektas pli bonan konduton, kiel pruvas la honorpremio de li ricevita fine de la tria studjaro. Certe, la kolegia pastro ludis gravan rolon en la vivkonduto de la lernantoj, kaj, sendube, en Baugé, Klemento ekkonscias pri la graveco de servoj al mizeruloj fare de kristanoj. Vivantaj ekzemploj estis al li donitaj de fondintinoj de du surlokaj malsanulejoj, el kiu unu nomiĝas "de la nekuracebluloj".

Vere, tiu urbeto atestas pri karitataj tradicioj.

( daŭrigota)

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

VOJAĜO EN ISLANDO

Islando estas lando de kontrastoj. En unu jarcento ĝi pasis de kampara socio al moderna ŝtato, kies vivnivelo estas unu el la plej altaj en la mondo.

En Islando oni trovas nek popolamason nek polucion. Oni povas vidi gejserojn, lagetojn plenajn je bolanta fango, imponajn akvofalojn kaj glaciajn morenojn. En tiu lando oni ŝatas la marventon, la akvopurecon, la mirindan purecon de la kampoj kaj urboj. La glaciejoj kovras 11% de la islanda insulo.

Multegaj birdoj vivas en vastaj grupoj, nestantaj meze de rokoj kaj klifoj. Pli ol 75 birdospecoj estas konataj: fraterkuloj, suloj, ŝternoj...

Sur la kampoj sin paŝtas 500 000 ŝafoj, 90 000 ĉevaloj, 70 000 bovinoj. Sur la vulkana insulo Islando, kies enloĝantaro ne superas 250 000 homoj, Naturo havas fascinan belecon.

En la hoteloj la servistaro estas tre juna. Plej ofte la kelneroj estas lernantoj, kiuj deĵoras dum la libertempo; ĉiuj estas ege afablaj, ĉiam ridetantaj kaj perfekte puraj. Bedaŭrinde krom la islandan, ili parolas nur angle.

Sur la kamparo oni admiras multajn preĝejojn, ofte lignajn, proksimume 10-15 metrojn longaj, 7-9 metrojn larĝaj.

Laŭ paroĥa bulteno, esperantigis A. B.

VIVO DE JOHANA JUGAN ( daŭrigo)

Post la morto de F-ino Lecocq en 1835, Johana laboris en diversaj famílioj kaj akiris multe da geamikoj, i.a. Franciska Aubert (Ober'). Ili luis loĝejon kaj kunvivis preĝante kaj laborante. Baldaŭ aliĝis al ili 17-jara orfino, Virginia Tredaniel. Ekde 1838, la tri virinoj kunvivis.

Johana pli kaj pli kompatis al la mizeruloj; en 1839, ŝi enkondukis Anna Chauvin (Ŝovin') blindan kaj kriplan inon kaj donacis al ŝi sian liton. Sekvis Izabela Coeuru (KerÜ), al kiu Virginia cedis sian liton. Ĉar nur tri laboris por vivteni 5 personojn, Johana komencis almozpeti ĉe la amikaj familioj. Maria kaj Virginia parolis pri sia spirita interhalpo al P-ro Le Pailleur, kiu estis ilia konfesprenanto. En 1840, li helpis la tri amikinojn fondi karitatan asocion al kiu baldaŭ aliĝis Magdalena Bourges (Burĵ'), 27-jara, sed grave malsana. Ŝi resaniĝis kaj partoprenis en la komuna strebo. Tiel naskiĝis eta ĉelo, kiu iĝis poste "la etaj fratinoj de la malriĉuloj".

La domo estis plena. En 1841, la 12 virinoj translokiĝis al iama trinkejo, kiu baldaŭ montriĝis ne sufiĉe vasta. En februaro 1842, ili aĉetis malnovan monaĥejon "la domo de la kruco". Kun helpo de P-ro Le Pailleur, ili kompletigis sian regularon kaj nomiĝis "Servistinoj de la malriĉuloj". Ili elektis Johanan kiel superulinon kaj promesis al ŝi obeon. En novembro 1842, estis en la "Domo de la Kruco" 26 maljunulinoj, el kiuj kelkaj grave malsanaj. Magdalena kaj Virginia ĉesigis sian profesian laboron por sin dediĉi tute al la priservado de la akceptitoj. Same faris Maria. Ekde tiam, oni fidis nur la almozpetadon iniciatitan de Johana por certigi la vivtenon ... kaj elpagi la domon. Kuracisto, kiu jam konis Johanan en la malsanulejo "de Rosais" konsentis kuraci senpaĝe la maljunulojn ĝis 1857.

En la vintro 1842-43 alvenis la unua viro; baldaŭ sekvis pliaj. La fratinoj kolektis ne nur monon, sed ankaŭ manĝorestaĵojn, ŝtofon. Fine de 1844, ili povis repagi sian tutan ŝuldon ... kaj komencis konstrui novan domon sen groŝo en poŝo. Ĉiuj klopodis per donaco de ŝtonoj aŭ cemento, senpaga transportado. Por elpagi la mankantan sumon trafe alvenis premio de la Franca Akademio, kiu ĉiujare rekompencis malriĉan francon farintan la plej meritoplenan agon. Ĉeestis la transdonon de la premio V. Hugo, Lamartine, Châteaubriand. La gazetaro raportis. Johana montris la broŝuron atestantan la transdonon de la premio, kaj tio tre efikis ĉe la kolektado, kiun ŝi daŭrigis ĝis 1852.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

SKRIBAS LA LEGANTOJ

Baldaŭ 85-jara kaj patriarko de 29 posteuloj, mi estos duonbone praktikinta Esperanton nur, ve, por mia egoista plezuro. Klare, mondo kap' al piede! Ne mirige, ke Esperanto restas ĉirkaŭ mi en la nenieco...

Blovu la Spirito, alfluu la nova primavera suko.

M. LE MARQUAND

N.D.L.R. Mi volonte ricevos pliajn kontribuaĵojn. Skribu, skribu, skribu...

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

NIA MEMBRARO

Novaj membroj 1993: 1. S-ro ANGEVIN (Sarthe); 2. S-ro LATASTE (Vendée); 3. S-ro RIVORY (Loire)

Tutfratan bonvenon al ili. Ĉu ili konsentus sin prezenti en la venonta bulteno?

Membroj bonfarantoj: 6. S-ro LE MARQUAND (Manche)

Dankegon al la bonfarantoj, kiuj grave helpas la asocion.

I.K.U.E. membroj: 1. P-ro SCHNEIDER; 2. S-ro SAUTREUIL; 3. S-ro MILLET; 4. P-ro RUNPAUT; 5. S-ro JUSSINET; 6. S-ro VERNIN; 7. S-ro THIOLLIERE; 8. S-ro DOYELLE; 9. S-ro BLIN; 10. G-roj SANSON; 11. S-ro AMOUROUX; 12. S-ro BERNARD; 13. S-ino PETIT-BRICOUT; 14. S-ro VERNIN; 15. S-ino GILLES; 16. S-ro SEGUIN;

## PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO EN LOURDES

Dato: 16-an de aprilo 1993;
Ĉeestis: P-ro Bourdon, F-to Marmou, S-roj Bessière, Colas, Despiney, Pons, Villeneuve.
Petis senkulpigon: P-ro Héroux, S-ino Vincent, F-ino Preux.

La komitato komencis la preparon de la venonta kongreso, kiu okazos en "Ermitage St-Jean" en Moulins-lès-Metz de la 13-a ĝis la 17-a de majo 1994. Oni jam skizis la programon, kun vizito al la urbo Metz.

En 1995, la kongreso okazos en la seminario de Limoges.

La kvar komitatanoj (P-ro Bourdon, S-roj Bessière, Colas kaj Despiney), kies ofico finiĝos en 1994, jam indikis, ke ili rekandidatiĝas.

Okaze de la jubileo de P-ro Bourdon, la komitato decidis donaci al li la libron "Atlas des religions" kaj aliajn librojn laŭ lia deziro.

En oktobro, oni pripensos la eldonon de nova informilo.

Ĉar P-ro Héroux, malsana, ne ĉeestis, ne eblis havi detalan informon pri la ekumena kongreso en Viviers.

Ne eblis organizi E°-diservon dum la nacia kongreso en Pau.

La komitato bedaŭras, ke IKUE ne plu funkcias. Neniu konas la kialon de la neaperado de E.K.. Ni esperu, ke ĝi estos baldaŭ reeldonita.

La venonta komitatkunveno okazos la 20-an de oktobro 1993 en Monaĥejo S-ta Jakobo 20, rue des Tanneries 75013 PARIS.

## PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO

Dato: 17-an de aprilo. Prezidas S-ro Bessiere.

Post legado de la senkulpigaj kaj salutleteroj, oni aprobas la agadan kaj la financan raportojn.

S-roj Colleu kaj Pons nombris la voĉdonilojn por la renovigo de 1/3 de la komitato. Jen la rezulto: voĉdonis 33

| | |
|---|---|
| Ricevis: P-ro Héroux 33 voĉojn | S-ro Lafargue 33 |
| F-ino Preux 33 | S-ino Vincent 31 |

Ĉiuj estas reelektitaj.

La prezidanto informas la ĉeestantaron pri la venontjara kongreso en Moulins-lès-Metz kaj pri la donaco farota al P-ro Bourdon okaze de lia sacerdota jubileo.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## EMILE PELTIER

(el parolado en Lourdes dum pilgrimo al lia tombo)

Ni kunvenas ĉi tie por honori la memoron de P-ro Peltier, malĝoje, ĉar multaj esperantistoj, eĉ katolikoj, ne sufiĉe konas lian vivon kaj verkon, sed ĝoje pro la ekzemplo, kiun li lasis al ni kaj la vojon, kiun li montris al ni. P-ro Peltier estis pioniro, li iniciatis modernajn ideojn, kiuj florados nur longe post lia morto.

Kiam li naskiĝis la 20-an de septembro 1870 en eta vilaĝo de la diocezo Tours, nenio anoncis lian pioniran vivon. Li decidis esti pastro kaj eniris la seminarion (1884), kie li montris emon al la studado de lingvoj. Li lernis la anglan, la germanan, la italan, la hispanan kaj la portugalan. La 27-an de majo 1893, li pastriĝas kaj estas sendita en la kolegion S-ta Greogorio en tours por instrui la anglan.

En 1902, li ekkonas Esperanton kaj tuj komprenas la valoron de la Internacia Lingvo; li deziras uzi ĝin por la bono de la Eklezio kaj la disvastigo de la Fido. Tial li provas fondi asocion de katolikaj esperantistoj, sed sensukcese.

En oktobro 1903, li eldonas katolikan revuon "Espero Katolika", sed la sukceso ne venas. Estas nur 250 abonantoj. Tamen li ne senkuraĝiĝas.

En 1905, en Boulogne apud maro, okazas la unua Universala Kongreso. P-ro Peltier kun multaj aliaj katolikoj ĉeestas ĝin kaj organizas diservon en kiu D-ro Zamenhof, kvankam ne kristano, partoprenas. Tio kuraĝigas la katolikojn, kiuj decidas energie batali por la disvastigo de "Espero Katolika" kaj de la kristana idealo pri frateco, unua dia ordono.

../...

En oktobro 1905, P-ro Peltier, vera pioniro de moderneco, proponas, ke la revuo iĝu ekumena, kaj li malfermas ĝin al ĉiuj kristanaj pastroj en spirito de frata toleremo. Tiu ideo ricevas favoran apogon, ĉefe de la anglikanoj.

La jaro 1906 favoras la agadon de P-ro Peltier. Dank' al M-ro Giambene, roma prelato, li transdonas al Papo PIO X-a la plenan jarkolekton de "Espero Katolika". La Sankta Patro montras intereson kaj aprobas la faritan agadon. La 27-an de junio, li sendas al M-ro Giambene leteron, en kiu li dankas P-ĉon Peltier kaj transdonas al li kaj al la redaktantoj de la revuo sian apostolan benon. Tiu letero, legata en la U.K. en Ĝenevo, vekas la entuziasmon de la ĉeestantoj kaj multaj nekatolikaj esperantistoj alportas al P-ro Peltier sian apogon. Dum la kongresa diservo, P-ro Peltier ricevas de la tiea episkopo la permeson prediki en E°. En sia prediko, nia fondinto rajtas fieri kaj parolas pri bapto de Esperanto.

Tamen P-ro Peltier, kiu zorgas pri la administrado kaj eldonado de la revuo dum sia libera tempo, rapide laciĝas kaj liaj fortoj elĉerpiĝas. Li devas elekti inter sia laboro kiel profesoro ĉe S-ta Gregorio kaj tiu kiel redaktoro de la revuo. Li longe hezitas kaj fine decidas tute dediĉi sin al sia apostola laboro pere de Esperanto. Lia persistemo ricevas rekompencon: en 1907, la abonoj forte kreskas, sed la sanstato de P-ro Peltier malboniĝas. Li ne povas ĉeesti la 3-an U.K. en Cambridge. Li tamen ĝojas, kiam li ekscias, ke la Papo sendis sian benon al la katolikoj ĉeestantaj.

En tiu epoko oni starigas la Internacian Katolikan Asocion, kiu kunligas ĉiujn abonantojn al la revuo.

En julio 1908, P-ro Peltier vizitas Lourdes la duan fojon, kun la pilgrimo de la diocezo Tours. Li tutspeciale honoras la Dipatrinon de Massabielle. Samtempe li publikigas en Esperanto broŝuron pri la mirakloj en Lourdes.

Post lia reveno en Tours, lia sanstato forte malpliboniĝas kaj li ne povas aperigi la revuon dum tri monatoj. Fine li rezignas pri sia tasko kaj transdonas la redaktadon al S-ro Claudius Colas, kies filo hodiaŭ ĉeestas nian kunvenon.

Li translokiĝas en Pau, kie li esperas trovi pli sanigan klimaton kaj esti proksima al Lourdes, kien li ofte pilgrimas. La 16-an de februaro 1909, dum li estas tie, li forpasas. Laŭ lia deziro, li ripozas en la tombejo, kie ni nun staras, antaŭ lia tombo, kiun nia asocio restaŭrigis antaŭ kelkaj jaroj. Li mortis juna, nur 39-jara, sed forlasis belan memoron kaj posteulojn por daŭrigi lian agadon.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## KASISTINA ANGULO

Unu el miaj instruistinoj el la tiama "Komplementa kurso" kutimis diri, ke ripetado estas la ŝlosilo de la instruado. Por instrui al la forgesemuloj, ke de longe pasis la ĝusta tempo por pagi la kotizon 1993, mi denove ripetos la lecionon: nepre notu sur via agendo aŭ sur via murkalendaro, ke la plej bona momento por tion fari estas la monato JANUARO - eĉ preferindus sendi la ĉekon jam en decembro por ke ĝi atingu la asocian kason precize en januaro. Ĉu notite?

Nu, jam alvenis majo, la flormonato, kaj ankoraŭ ... 42, jes, vi ĝuste legis, kvardek du membroj ankoraŭ ne pagis sian kotizon! Ĉu eble VI? TUJ kontrolu ne devigu min sendi 42 alvokojn kaj elspezi 42 x 2,20 F! Per tiu sumo, tute perdita por la asocio, eblus sendi la bultenon al du nepagipovaj alilandanoj. Pripensu tion kaj senprokraste plenigu vian ĉekon! Antaŭdankon.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## LA EKLEZIO PAROLAS AL NI PRI PACO

La respekto kaj la kreskado de la homa vivo petas la pacon. La paco ne estas nura foresto de milito kaj eĉ ne kontentiĝas je certigado de la ekvilibro de la kontraŭaj fortoj. La paco ne povas ekzisti sur tero sen la protektado de la personaj posedaĵoj, la libera komunikado inter la homoj, la respekto de la digneco de la individuoj kaj popoloj, la daŭra praktikado de frateco. Ĝi estas "orda kvieteco". Ĝi estas verko de la justeco kaj efiko de la karitato.

La tera paco estas bildo kaj frukto de la paco de Kristo, la mesia "Princo de la paco". Per la sango de sia Kruco, li "mortigis la malamon en sia propra karno"(Ef.2,16), li repacigis la homojn kun Dio kaj faris el sia Eklezio

../...

## TIAM VENOS LA PACO

Se vi kredas, ke rideto pli fortas ol armilo,
Se vi kredas je la potenco de proponita mano,
Se vi kredas, ke tio, kio kunigas la homojn pli gravas ol tio, kio ilin disigas,
Se vi kredas, ke malsimileco estas riĉaĵo kaj ne danĝero,
Se vi scias rigardi la alian kun ereto da amo,
Se vi scias preferi la esperon ol la suspekton...

T I A M V E N O S L A P A C O

Se vi opinias, ke ne la alia devas fari la unuan paŝon, sed vi,
Se infana rigardo ankoraŭ sukcesas senkolerigi vian koron,
Se vi kapablas ĝoji pro la ĝojo de via najbaro,
Se la maljustaĵo, kiu trafas la aliajn, vin indignigas same kiel la de vi elportata,
Se por vi la fremdulo estas frato al vi proponita,
Se vi scias pro amo donaci iom de via tempo,
Se vi scias akcepti la servon de alia,
Se vi dividas vian panon kaj scias aldoni al ĝi pecon de via koro,
Se vi kredas, ke pardono iras pli malproksimen ol venĝo...

T I A M V E N O S L A P A C O

Se vi scias prikanti la feliĉon de la aliaj kaj pridanci ilian ĝojon,
Se vi kapablas aŭskulti la malfeliĉulon, kiu perdigas al vi tempon, kaj daŭre rideti al li,
Se vi scias akcepti kaj adopti opinion malsimilan je la via...

T I A M V E N O S L A P A C O

Se vi rifuzas frapi vian kulpon sur la bruston de la aliaj,
Se por vi la alia estas unue frato,
Se la kolero estas por vi malfortaĵo, ne pruvo pri forto,
Se vi preferas ricevi damaĝon ol damaĝi al iu,
Se vi rifuzas, ke post vi okazu diluvo,
Se vi partianiĝas al la malriĉulo kaj al la subpremato sen konsideri vin kiel heroon,
Se vi kredas, ke la amo estas la sola dorto por diskuti,
Se vi kredas, ke la paco estas ebla

... T I A M V E N O S L A P A C O

Pierre GUILBERT

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## ESPERANTO-KALENDARO

KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ - 1. Someraj E°-kursoj en la ŝtata universitato de San Francisko. Informas: Cathy Schulze, 410, Darrell Rd, HILLSBOROUGH, CA 94132 USA. Datoj: 24-a de junio ĝis 16-a de julio.

2. Ruslanda E°-Asocio, pk 67, RUS-620077 JEKATERINBURG, organizas, de la 1-a ĝis la 14-a de junio internacian transsiberian vojaĝon al Bajkala Lago.
3. Internacia medicina konferenco en VESZPREM (Hungario), 8-11-an de julio. Informas: D-ro Istvan Hegyi, Battyany u. 19, D2/9, H-8200 VESZPREM.
4. Internacia vegetarana E°-renkontiĝo en CLUJ-NAPOCA (Rumanio), 17-21-an de julio. Informas: E°-Asocio Kluĵo, C.P. 1111, R-3400 CLUJ-NAPOCA.
5. La Kultura Centro Esperantista en La Chaux de Fonds organizas renkontojn kaj kursojn. Informas: KCE, Pk 779, CH-2301 LA CHAUX DE FONDS Svislando.
6. La esperantista staĝejo "Kvinpetalo" proponas diversajn kursojn kaj renkontojn. Petu la programon: F-86410 BOURESSE.

7. Kaj ne forgesu, ke la E°-Kulturdomo Gresillon estos malfermita de la 23-a de junio ĝis la 2-a de septembro. Petu la programon: Esperanto-Domo, Informservo, 17, rue César Franck, 44240 LA CHAPELLE-sur-Erdre, Franeujo.

NOVA ELDONAĴO: Fine aperis la tiel longe atendita vortaro franca-esperanta. Oni solene prezentis ĝin en Paris, en Forum des Halles, okaze de la Zamenhof-tago.

KONGRESOJ EN 1994: la 79-a U.K. de U.E.A. okazos en Seulo (Koreujo) de la 23-a ĝxx ĝis la 30-a de julio.
Tuj poste, de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto, okazos la I.J.K. (Internacia Junulara Kongreso).

Informoj eltiritaj el "Kulturaj Kajeroj", trimonata informada kaj kultura revuo

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## KOTIZTABELO 1993

| | |
|---|---|
| I.K.U.E. kun "Espero Katolika" | 150 F |
| Peranto: P-ro R. DEGRELLE p.ĉ.k. NANCY 2 555 38 L. | |

--------

| | |
|---|---|
| A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo | 40 F |
| geedza paro | 50 F |
| infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | 20 F |
| bonfaranto | 200 F |

--------

| | |
|---|---|
| U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" | 260 F |
| U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro | 275 F |

Association Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## ENHAVO

1. Le mot du président
2. Preĝoj al la S-ta Spirito
La vera amiko
3. La vintra tago
Pri Klemento Myionnet
Vojaĝo en Islando
4. Vivo de J. Jugan
Skribas la legantoj
Nia membraro
5. Protokoloj de la kunvenoj en Lourdes
Emile Peltier
6. Kasistina angulo
La Eklezio parolas al ni pri paco
7. Tiam venos la paco
Esperanto-kalendaro

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

Dépôt légal: 2ème trimestre 1993 !! Polycopié par l' A.C.F.E.(enregistrée le 6
!! mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur
C.P.P.A.P. n° 62 532. !! sous le n° 2523 bis,J.O. 23/05/1977)
Directeur: Albert BESSIERE !! au prieuré St-Martin
Directeur-délégué: !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
René-Jean MARMOU !! FRANCE